# KATOLIKA SENTO

'72



5

rm

U.E.C.I. ANNO 51°

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE

## KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 51° - 1972**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

# KATOLIKA SENTO

51a Jaro n°5 Majo 1972


## AL NIA SINJORINO DE L' ESPERO

Saluton, ho filin' de Nazareto,
virino favorata de l' destino,
senpeka, laŭ l' anonco de l'profeto,
Di-servantino.

La dian Filon, la homarsavanton
vi pie gardis en la virga sino;
ĉe kripo naskis vi la pacportanton,
dolĉa patrino!

L' animon vundis akra ŝirdoloro:
ĉe l' kruc' rigardis vi, dum kapoklino,
la Reĝon de l' ĉielo, kun adoro,
muta patrino!

Li venkis morton; estas Li glorata.
Kaj vi fariĝis, ĝis la tempofino,
de la pekanta mondo la beata
propetantino.

Al vi ascendas nia preĝ-ofero,
esperantista sankta patronino,
ho Nia Sinjorino de l' Espero,
mondo-Reĝino!

Romo, 15/4/1972 Luigi Minnaja



Nia Sinjorino de la Espero
Patronino de la Esperantistoj

## NIA SINJORINO DE LA ESPERO PATRONINO DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

En la sanktujo de miaj memoraĵoj, kiujn ame kaj pie mi gardas kun tute speciala zorgemo, troviĝas libreto kun verda kovrilo jam iom flaviĝinta pro la tempopaso. Ĝi estas la "Adresaro de la Katolikaj Esperantistoj", kompilita de P. Giacomo Bianchini, ĝenerala sekretario de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), kaj aperinta en 1915-a.

La liston de la adresoj antaŭas ĉarma bildo pri la Sankta Virgulino, kun la suba skribaĵo "Nia Sinjorino de l' Espero, Patronino de la Katolikaj Esperantistoj (en la preĝejo de Barbarà del Vallés, Katalunlando)". Tiu sciigo estis por mi tute nova. Kiam kaj kie estis farita tiu decido elekti Nian Sinjorinon de la Espero Patronino de la Katolikaj Esperantistoj? Sendube en iu Kongreso aŭ iu alia grava kunveno; sed en kiu? Mi foliumis ĉiujn numerojn de la revuo "Espero Katolika" publikigitajn ĝis 1914-a, sed en neniu mi trovis mencion pri tiu ĉiela patroneco. La granda scivolemo kaj la ĝojo scii, ke kiel Patronino de la Esperantistoj estis elektita la Sankta Virgulino, instigis min etendi la serĉadojn ankaŭ en ne-esperantistaj gazetoj, kaj tial mi pacience legis en "L'Osservatore Romano" kaj en "Corriere d'Italia" la raportojn, verkitajn de la sama persono, pri la diversaj kunsidoj de la 4-a Kongreso de la Katolikaj Esperantistoj, disvolviĝinta en Romo de la 4-a ĝis la 10-a de septembro 1913-a, kaj dum kiu, la 8-an de septembro, la Kongresanoj estis akceptitaj en aŭdienco de Papo Pio X.

Mia serĉado estis kronita de sukceso: en la numero de la 12-a de septembro de "Corriere d'Italia" kaj en tiu de la posta tago de "L'Osservatore Romano" la artikolo sub la titolo "La fermo de la Kongreso de la Ka-

tolikaj Esperantistoj" finiĝis jene: "Post kelkaj vortoj de la prezidanto Parker estis aprobita la propono de la hispana abato Planas elekti kiel Patroninon de IKUE la Virgulinon sub la antikva nomo "Nia Sinjorino de la Espero". La Kongreso estis deklarita fermita, kaj la kunsido finiĝis per la kanto de la Katolika Esperantista Himno."

Tiel la enigmo estis solvita.

P. Jozefo Planas vivadis en la vilaĝo Barbarà del Vallés (proksime de Sabadell, en Katalunujo), kie estis ankaŭ esperantista societo sub la nomo "Esperanta Nesto".

Ke la proponon faris hispano estas komprenebla, ĉar la Sankta Virgulino sub la titolo de la "Espero" estas tre kultata en Hispanujo, verŝajne pro la fakto, ke la antifono "Salve, Regina", laŭ unu el la tradicioj, ŝajnas esti verkita de episkopo el Compostella en la 13-a jarcento.

La decido alprenita dum la 4-a Katolika Kongreso restis notita nur en "L'Osservatore Romano" kaj "Corriere d'Italia" kaj en la "Adresaro de la Katolikaj Esperantistoj". La unua mondmilito interrompis ĉiun agadon de nia movado kaj forgesigis eĉ al la plej fervoraj katolikaj esperantistoj tiun decidon, kiu ja estis tiom grava.

Post multaj jaroj mi volis ĝin revoki al la memoro! En miaj serĉadoj pri la kulto al la Virgulino en Italujo mi trovis, ke en Romo, en la preĝejo de la Kapucenoj nomata "Tre Sankta Koncipiĝo" estas iu kapelo dediĉita al la Sankta Virgulino de la Espero, pri kiu troviĝas bildo ĉe la altaro. Post vizito al tiu preĝejo mi raportis al P. Jacobitti, kiu akordiĝis kun la tieaj Kapucenoj por povi celebri la meson en tiu templo en 1963-a okaze de la 50-a jarreveno de la elekto de Nia Sinjorino de la Espero kiel Patronino de la Esperan-

tistoj. Kaj tiel la 17-an de novembro de tiu jaro, trian dimanĉon de la monato, P. Jacobitti celebris ĉe la ĉefaltaro de tiu preĝejo la unuan meson honore al la ĉiela Patronino en ĉeesto de multenombra grupo da gesamideanoj kun flago, kaj al ili li parolis en Esperanto por klarigi la altan edifan signifon de la ceremonio.

La postan jaron, la 15-an de novembro, la meson celebris monsinjoro Edmondo Macheiner, tiam helpepiskopo en Salzburg (Aŭstrujo), ĝuste ĉe la kapelo dediĉita al Nia Sinjorino de la Espero; kaj la 21-an de novembro 1965-a, ĉiam ĉe la sama altaro, plenumis la sanktan riton monsinjoro Alfredo Pichler, episkopo en Banja Luka (Jugoslavio).

Bedaŭrinde la multaj mesoj celebrataj la trian dimanĉon de novembro ĉe tiu altaro ne donas la eblecon adresi la parolon al la ĉeestantoj eĉ dum mallonga tempo. Tial oni pensis, ke estus bone, se la Katolikaj Esperantistoj havus tute apartan bildon pri Nia Sinjorino de la Espero, por propra kulto. Al la realigo de tia ideo fervore sin dediĉis la dominikana pastro Arcangelo Intreccialagli, tiel ke lia bela pentraĵo povis ricevi la benon de Papo Paŭlo VI en la baziliko de Sankta Petro la 22-an de februaro 1967-a.

Laŭ interesiĝo de la franciskana pastro Carlo Cecchitelli, antaŭ ne longe oni planis starigi mozaikan reprodukton de tiu pentraĵo ĉe la nova baziliko dediĉita al la mistero de la Anunciacio en Nazaret. Tiel la bildo de nia ĉiela Patronino aldoniĝos kiel tria memoratesto de la Katolikaj Esperantistoj en la lando de Jesuo, post la panelo pri "Pater" en Jerusalemo, kaj tiu pri "Magnificat" en Ain Karem.

Luigi Minnaja

EN LA MIRINDAĴOJ DE LA NATURO LA SIGNO DE LA AGANTA PENSO

(Antaŭ ol reciti la preĝon "Regina Coeli" (Cielo-Reĝino) kune kun la fideluloj kunvenintaj en placo Sankta Petro, Paŭlo 6-a, dimanĉon la 30-an de aprilo, jene invitis la ĉeestantojn al meditado pri la mirindaĵoj de la naturo)

La scenejo de la mondo prezentas faktojn kaj problemojn tre interesajn kaj maltrankviligajn. Estas tamen fakto, bone konata, sed ĉiam nova, kiu ne povas lasi sensenta nian atenton: ĝi estas la printempo, ĉi tiu nun malfermita revekiĝo de la naturo; la vegetaĵoj rekomencas flori, plenaj de fortikeco, de beleco kaj de poezio. La vivo renaskiĝas.

Kiel ni povas ne enŝoviĝi en la ĥoron de la aĵoj, kiuj ŝajnas kanti la himnon de la vivo, kaj fariĝi ni mem, kreaĵoj pensantaj, voĉo konscia kaj preĝanta, ekkriante kun ili, kiel instruas nin la sanktaj libroj; "benu la Sinjoron, verkoj ĉiuj de la Sinjoro, laŭdu lin kaj superekzaltu lin tra la jarcentoj"?

Jes, ankaŭ tion ni devas fari: observi, studi, admiri la bildon grandegan kaj mirindan, en kiu disvolviĝas nia ekzistado: ĝi konsistas el la ĉieloj kun siaj silentaj kaj timigaj profundaĵoj; el la atmosfero kun sia viviga spiro, siaj ventoj kaj siaj tempestoj; el la akvo, ankaŭ ĝi amika kaj terura kun siaj senlimaj oceanoj; kaj el la tero, ĉi tiu tero, patrino dolĉa kaj dura, nun tute feste vestita, kaj tute loĝata de animaloj vivaj kaj tre okupitaj, fekunda por ni je ĉiu peno kaj je ĉiu riĉaĵo.

Niaj okuloj ne estu indiferentaj antaŭ tioma brilo. Nia tempo ree enamiĝas je la naturo; ĝi estas la verko de Dio konfidita al la homo. Sed ĉi tiu nia miro pri la naturo ne devas esti miopa kaj materialisma.

La naturo, ni povas diri, estas revelacio spiritualisma por tiu, kiu kapablas kontempli ĝin kun penetrema inteligenteco, kaj kapablas ekvidi en ĝi manon kreantan, penson agantan, sekreton indan je adoro, kaj por ni, disĉiploj de la Vorto enkarniĝinta, indan krome je amo kaj je poezio.

Sankta Francisko instruu al ni asocii nian voĉon al lia kantiko "frato Suno"; kaj antaŭ ol li la ĥoro de la Psalmoj, kiu ne ĉesas inviti nin: "kantu al la Sinjoro novan kantikon, ĉar Li faris miraklojn".

Ĉi tiu inspiro de la naturo fariĝinta travidebla danke al sento religia, enkondukita en nian spiriton, igas ĝin pli pia, pli feliĉa kaj pli bona. Ĝi helpas nin labori kun amo kaj kun konfido; kaj la "Rozo Mistika" konsolas nian prozecan kaj amaran penon.

trad. L.M.

......

POR LA MOZAIKO HONORE al N.S. de la Espero:

| | |
|---|---|
| Vallotto Arturo -(Verona) | 2.000 |
| St.Pietrzak - (Pollando) | 5.000 |
| S.F.Messina - (Romo) | 1.000 |
| E.Thiolliére - (Francujo) | 10.000 |
| B.Krzan - (Pollando) | 2.000 |
| A.Rakoczy - (Pollando) | 2.000 |
| K.Martynski - (Pollando) | 3.000 |
| A.Signore - (Romo) | 10.000 |
| V.Corrias - (Cagliari) | 7.645 |
| T.Nowakowski - (Polonia) | 2.000 |
| L.Terrazzani (Verona) | 10.000 |
| Entute: | 169.645 |

Atentu: ĉiuj, kiuj donacos tiucele almenaŭ 10.000 lirojn, ricevos omaĝe de ni bildkarton de tiu Madono,

benitan de la papo, kun Vatikana poŝtmarko kaj poŝta stampo de la tago de ĝia inaŭguro.

GRAVA SCIIGO POR LA KATOLIKAJ esperantistoj: estos baldaŭ havebla ĉe ni la kolora religia bildeto pri "Nia Sinjorino de la Espero", Patronino de la Esperantistoj". Post la dissendo en la mondon de 10.000 bildkartoj de la sama bildo, ni deziras ankaŭ al la eta religia bildeto la saman sukceson. Ni invitas ĉiujn katolikajn e-istojn peti ilin de ni; kaj ni sugestas, ke ĉiu E-grupo, disdonante al siaj membroj la bildeton, kolektu monsumon, por kontribui iel al la mozaiko de la sama Madono en Nazareto.

KUN PARTOPRENO de multenombraj gesamideanoj brile sukcesis la inaŭguro de la Itala Esperanto-Biblioteko ĉe Kastelo Malaspina en Massa. La programo de la manifestacio komenciĝis sabaton, la 22-an de aprilo, vespere, per dancofesto de la junularo, kiun gajigis la orkestro "Verda Stelo" kaj per kantado de esperantlingvaj kanzonoj. Dimanĉon, la 23an, je la 9a h. en la katedralo plenplena de popolo, kun ĉeesto ankaŭ de la urbestro, celebris la sanktan meson en Esperanto kaj homiliis p. Albino Ciccanti. Je la 10a h. la gesamideanoj aliris la kastelon Malaspina, kie, akceptitaj de pluraj aŭtoritatuloj, ili vizitis la salonon destinitan per formala kontrakto al la Esperanto-Biblioteko. La familio de la forpasinto prof. Grazzini, kiel unua, donacis al ĝi 400 volumojn. Je la 11,30 en la salono de la Svisoj ĉe la Duka Palaco okazis la oficiala inaŭguro kun ĉeesto de la plej elstaraj personoj de la urbo, de la provinco kaj de eminentaj esperantistoj, inter kiuj inĝ. Azzi, prezid. de la Itala Espe-

ranto-Federacio, gefratoj Catina kaj Mario Dazzini, kiuj havis la iniciaton pri la starigo de la Esperanto-Biblioteko, prof. Bruno Migliorini de la universitato de Florenco, Elio Migliorini de la universitato de Romo, Alessandro Bausani de la universitato de Napolo kaj multaj aliaj. Per tiu iniciato Massa fariĝas la kultura centro de la Esperanto-Movado en Italujo, kaj, invitante la italajn kaj alilandajn asociojn viziti la bibliotekon kaj donaci al ĝi taŭgan materialon, ebligas organizadon ĉe tiu sidejo de studkunvenoj, renkontiĝoj, seminarioj kaj aliaj kulturaj aranĝoj kun internacia karaktero. Tiel la instanco por la prizorgado de kasteloj en la regiono de Massa sukcesos pli diskonigi la allogojn de urbo, kiu per siaj maro kaj montoj estas unu el la plej ĉarmaj en Italujo. Kunvenoj por junulara lingva seminario daŭris en la kastelo ĝis la posta mardo.

"ESPERO KATOLIKA" jam anoncis ekde januaro la 34-an Internacian Kongreson de IKUE en Como kaj kunigis al la revuo la aliĝilon por la Kongreso. En la aprila numero ĝi aperigis ankaŭ la foton de la vere alloga kongresejo, kiu invitas al partopreno. Ni esperas, ke ĉiuj niaj legantoj, kiuj povos tion fari, eĉ kun iom da ofero, ne forlasos la gravan bonŝancon de la partopreno en la proksima IKUE-Kongreso.

;.................................................................

Iam vizitis papon Johanon iu episkopo kaj inter alie li plendis, ke granda respondeco por tuta diocezo tiom pezas lin, ke li ne povas nokte dormi. Papo komprenеme respondis: "Jes, mi komprenas vin bone, kara filo. Mi travivadis samon kiam komenciĝis mia papeco, sed poste mia ŝirmanĝelo ekflustris en mian orelon: Joĉio, ne taksu vin tiom grave! - kaj de tiam mi dormas bone". (El "Spirita taglibro de papo Johano". tradukis Grim.)

# ROMA ESPERANTA VOĈO
## n-o 105

ALIĜIS AL UECI-CECR: Catania: E.Grupo; Mezzolombardo (TN); P.Dao; Mantova: L.Freddi; L.Bianchi; Milano: M.Righi; Napolo: Centro Esp.Campano; Padovo: E.Grupo; G.Saggiori; Trento: E.Grupo; Trieste: Ass.Esp.Triest.: Aŭstrujo: W.Mudrak; Brazilo: A.Guiomar; Germanujo: H.Zimmerer; Hispanujo: C.F.Navarro; M.Cantalapiedra; Pollando: I.Horodecka; M.Sygnarski. Entute: 406.

MESOJ EN ESPERANTO estis jam celebritaj multfoje en diversaj urboj, okaze de esperantaj renkontiĝoj. Ni ĉiufoje sendis al la petintoj la koncernajn tekstojn. Ni memoras nur kelkajn inter ili: la 27-an de februaro en Chmielno (Pollando) (Tutpollanda Renkontiĝo de Esperantistoj Veteranoj); la 23-an de aprilo en Massa (Italujo) (inaŭguro de Esperanto-Biblioteko); la 30-an en Antverpeno (Belgujo) (Trilanda E-o Kongreso); samdate en Bologna (Italujo) (60a datreveno de la fondo de la grupo "E.Tellini"), kaj en St. Germain-en-Laye (Franca Katolika Kongreso); la 11-an de majo en Ternengo (Italujo) okaze de inaŭguro de Zamenhof-Strato. En Pentekosto (21-an de majo) okazos en Mantova (Italujo) (Esperantista Tago) kaj alia en Sorbolo (Italujo) (Inaŭguro de Esperanto-Strato).
Ĉi-okaze ni memorigas, ke ni jam pretigis ĉiujn ĉi-jarajn festmesojn ĝis nun okazintajn, laŭ la nova liturgia ordo de la tri cikloj, tio estas, por ĉiuj jaroj. La ĝisnunaj pretigitaj mesoj estas jam 33 (el la 75 antaŭvidi

taj). La ne malgrava laboro de ĉi tiu festmesalo estas tre aprecata de la katolika esperantistaro, kiu grand-nombre petis tion de ni. La tuta kolekto kostos it.lir. 3.000. Sed oni povas jam ricevi regule dum la kuranta jaro la aperintajn tekstojn. Espero Katolika, la organo de IKUE, aperigis preslitere la komunajn partojn de la meso, kun kelkaj ne gravaj diferencoj kompare al nia teksto, sed fundamente laŭ nia metodo; tiel ke oni povas peti de la IKUE-a redakcio tiujn, se oni preferas, kaj de ni la proprajôojn.

LA ROMA E.-GRUPO prizorgis por siaj kursanoj gramatikon tradukitan el la hungara "Esperanto I", de Dr. Szerdahelyi Istvàn; lernolibro jam delonge uzata ĉe unuagradaj kursoj. La libro, kiu enhavas 106 paĝojn, kun tutpaĝa bildo blanko-nigra en la koverto, tre bele aspektas, kaj estas havebla por £ 600, plus sendokosto.

Ni ankaŭ memorigas, ke ni povas ĉiam liveri la gramatikon: "Manuale Pratico della Lingua Esperanto", eldonitan de UECI: £ 500.

---

## El la Katolika Eklezio

---

### SIMPATIO DE LA EKLEZIO POR LA LABORISTA MONDO

(Parolado de la Papo okaze de la festo de la 1-a de majo)

Unua de majo: festo de la laboro!

Kia granda temo de studo kaj de parolo!

Temo aktuala, fundamenta, konstitucia! ĝi plene rilatas al la homa aktiveco.

Temo fekunda, kiu trairas la historion, la tekni-

kon, la ekonomion, la sociologion, la moralon, la politikon, la kulturon, la civilizon.

Kaj temo antropologia, teologia, spirita, kaj nun, kun la apero de Sankta Jozefo meze de la festo de la laboro, temo liturgia.

Temo, do, centra en la monda fenomeno de la evoluo kaj de la progreso homa; kaj tiel temo debatenda, eksploda, decida.

Kiom oni parolis pri ĝi; kiom oni parolas! Ankaŭ la Eklezio kiajn studojn, kiajn dokumentojn, kiajn eksperimentojn, kiajn klopodojn kaj kiajn verkojn abunde dediĉis al ĝi!

Ni nur mencias ĉi tiun temon, por ke, se necese, vi pensu pri ĝi, kaj konsciu la intereson, la gravecon, la kompleksecon de la temo, kiu rilatas al la laboro, kaj komprenu kiel ĝi supozas kaj samtempe produktas ĝeneralan konceptadon pri la vivo: ni estas en la moderna tempo, celebranta pleje la homan agadon, kiun ni nomas laboro. Al vi ĉi tiu studo, kiun, kiel vi scias, la Eklezio nutras per doktrino kaj ekzemplo.

Tro mallonga estas ĉi tiu momento por paroli pri ĝi. Ĉu vi scias? Se ni devus paroli pri ĝi, ni preferus paroli pri la Laboristoj, pli ol pri la Laboro en si mem; tio estas pri la homaj estaĵoj, pri la Personoj, kiuj agas en la laboro; kaj inter ili nia elekto irus al tiuj, kiuj al la laboro donas la manon, mi intencas diri la penon fizikan, la plenumon, pli ol al tiuj (cetere ja indaj ankaŭ ili je nia interesiĝo), kiuj ĝin pretigas per la studoj kaj ĝin direktas. Kaj ĉi tie, dum ĉi tiu mallongega momento, eĉ ne per la parolo ni volas konversacii kun la senfina mondo de la Laboristoj sed per alia rimedo de socia komunikado, rimedo silenta, kaj probable ne de ĉiuj perceptebla: la simpatio.

Jes, hodiaŭ ni adresas al ĉiuj Laboristoj ĉi tiun

fluon spiritan kaj koran: la simpation. Ĉi tiu ondo, ne videbla per si mem, havas tamen sian realecon kaj sian efikon. Nia simpatio, kiu estas tiu de la Eklezio, tiu de la persono, kiu sin deklaras disĉiplo de la Evangelio, elverŝiĝas sur ĉiujn Laboristojn; ni volus, ke ili tion sciu, eĉ ke ili iumaniere ĝin sentu. Voĉo de l' silento; sed voĉo vera.

.........................................

La Eklezio ne povas, ne volas rigardi al la Laboristo, ĝuste kiel tia, sen ĉi tiu neestingebla sento de simpatio. La Laboristo estas, fare de la Eklezio de Kristo, objekto de simpatio. Kion signifas simpatio? Ho! ĝi signifas multajn aferojn, kiujn ni ĉiuj konas! Ĝi signifas, antaŭ ĉio, partoprenon en la sufero de la aliaj; ĝi signifas moralan afinecon; ĝi signifas komprenon; ĝi signifas inklinon al la estimo, al la favoro, al la amikeco, al la servado, al la amo.

Ĉu la Eklezio posedas tian senton?

Jes, filoj kaj fratoj; jes, tion sciu, vi ĉiuj Laboristoj, al kiuj alvenas la eĥo de ĉi tiu simpla konfeso de simpatio, de ĉi tiu silenta alparolo.

Se ni dirus al vi la motivojn de ĉi tiu profunda sento, la alparolo ne estus plu silenta, sed ĝi estus senfine longa. La Eklezio havas simpation por la Laboristo, antaŭ ĉio, ĉar ĝi vidas kaj proklamas lian dignecon de homo, de frato egala al ĉiu alia homo, de persono netuŝebla, sur kies vizaĝo estas stampita aspekto dia. Kaj tio des plimulte ju pli estas markitaj sur lia vizaĝo la bezono, la malforteco, la sufero, la ofendo, la deziro de libero. La penado, la malriĉeco, la necerteco, la ekspluatado, kaj ankaŭ iu eventuala malsupereco estas motivoj por la simpatio de la Eklezio.

Kaj al la multaj aliaj kialoj, kiuj naskas en la koro de la Eklezio ĉi tiun simpation por la sennombra a-

maso de la homoj, kiuj pro la laboro ŝvitas, suferas kaj hodiaŭ atendas kaj postulas, estas aldonendaj je la fino ĉi tiuj du, kiuj resumas ĉiujn; unua: ankaŭ Kristo estis manlaborulo, devis labori ĉe la skolo de Jozefo, li estis nomata "la filo de la ĉarpentisto", li estis via kolego, Laboristoj, numero unua kaj numero lasta, ĉar li donis la vivon, la sangon por savi ĉiujn. Kaj la dua kialo: estas ĝuste de Kristo la krio, kiu ankoraŭ pasas tra la jarcentoj kaj sur la mondo: "Venu al mi, vi ĉiuj, kiuj estas lacaj kaj ŝarĝitaj, kaj Mi vin subtenos".

Ĉi tiu estas la simpatio de Kristo, de la Eklezio, ankoraŭ hodiaŭ por la laborista mondo.

trad. L.M.

"ĈU ONI DEVAS ANKORAŬ BAPTI la infanojn?" estas la titolo de libro, eldonita de "La Cittadella", verkita de p. Domenico Grasso, docento pri paŝtista doktrino en la Roma Gregoria universitato. La demando povas ŝajni ne atentanta la preskaŭ du miljaran tradicion de kristanismo, aŭ trotaksanta kelkajn niatempajn opoziciojn; ĉar fakte, hodiaŭ, unu el multaj ekleziaj kutimoj, kiujn oni volas revizii, estas ĝuste la denaska bapto. La problemo implicas multajn gravajn jurajn kaj religiajn principojn. Unue: ĝi estas komenco de supernatura ekzisto. Ĉu ĉi tio devenas de la antaŭvenanta amo de Dio aŭ de libera homa elekto? Kaj due: kia estas tiu homa libereco, kiu jam antaŭ sia decidkapablo estas orientata al iu celo? En la sakramento de la bapto, verŝajne pli ol en la aliaj montriĝas la sakramenta efiko, kiu transdonas la gracon per si mem: mistero de kredo! Jen kelkaj el la multaj kaj gravaj problemoj de la bapto. Kaj aliaj demandoj: Kiel aspektus tiu granda familio, kia estas e

klezio, tiu dia popolo, sen infanoj? ĉar al tio oni alvenus rifuzante la bapton al ĉi tiuj. Kia estus tiu teologio, kiu ne atentas psikologiajn kaj sociajn integriĝojn? Sed la tradicio de la eklezio estas por la valideco kaj neceso de la bapto al infanoj. Precipe en mortdanĝero, sed ankaŭ kiam temas pri infanoj apartenantaj al kristanaj familioj, kiuj garantias pri la iom-post-ioma eduko al kredo kaj al graco. Se tiu morala certeco mankas, oni povos ne rifuzi, sed prokrastigi la sakramenton, ĝis la familio estos al tio preparita, aŭ la interesito atingos aĝon por memdecido.

NOVA TEOLOGIA REVUO "Communio" aperis en la itala, sed baldaŭ ĝi havos eldonon ankaŭ en la germana, franca, pola, hispana kaj araba lingvoj. Unua ĝia inspiranto estas Hans Urs von Balthasar, kies artikolo malfermas la unuan numeron. Aliaj artikoloj estas subskribitaj de Cothenet, De Lubac, Corecco, Ruggieri kaj Bassani. La revuo ne volas esti abstrakta, sed praktika teologia studo: "medito pri la dia vorto enkarniĝinta en la kristana komunumo". Laŭ la redaktora grupo tio, kio plej mankis al la teologo estis ĝuste ĉi tiu rekta rilato al komunumo. "Communio" plenigante ĉi tiun mankon volas montri, ke "ankaŭ hodiaŭ estas eble laŭvivi plene kristanismon, kiel liberigintan travivaĵon". La iniciato montriĝas tre interesa kaj utila.

PAŬLO VI EN LA ĜENERALA aŭdienco donita je la 25a de aprilo al multaj miloj da personoj, adresis apartan saluton al la luterana episkopo de Vasteras, en Svedujo, Sven Silen, kiu ĉeestis kun multaj membroj de sia klerikaro kune kun iliaj edzinoj. "Ni esperas, diris la papo, ke via vizito estos nova paŝo laŭ la vojo de la repacigo en la kredo kaj en la karitato. Vi

venis kiel pilgrimantoj al la tomboj de la apostoloj kaj de la martiroj de la roma eklezio. Ĉi tie vi volis ankaŭ renkontiĝi kun niatempa eklezio, farante al ni viziton, kiu, ni vin certigas, estas tre ŝatata al ni; kaj vi volis ankaŭ renkontiĝi kun la roma klerikaro. Ĉi tiuj kontaktoj estas tre dezirandaj, eĉ necesaj, se niaj eklezioj devas kreskigi la reciprokan fidon kaj kune labori por restarigi la plenan unuiĝon, kiun Kristo volas".

ONI MALKOVRIS EN ROMO la plej antikvan tombon de roma episkopo, post tiu de la apostolo Petro en Vatikano: temas pri la martira papo sankta Kalisto, enterigita komence de la tria jarcento en la tombejo de Calepodio, ĉe la Aŭrelia strato. Oni sciis, ke tiuj relikvoj troviĝis tie, sed oni ne konis ĝis nun la precizan lokon. Fine la papa arkeologia komisio sukcesis aĉeti tiun terenon kaj enkonduki sisteme arkeologiajn priserĉadojn, sub la gvido de d.ro Aldo Nestori, bibliotekisto de la sama komisiono. La pozitivaj rezultoj estas priskribitaj en la Revuo de Kristana Arkeologio. Spite de la danĝeroj kaŭzitaj de novaj surkonstruaĵoj, de terglitoj k.s., oni trovis tiun tombon, indikitan de pentraĵoj kaj de skulptaĵoj. Sur unu el ĉi tiuj estas skribite en la latina lingvo: "Al Sankta Kalisto plenumis voton Alfio".

GRUPO DE 33 TEOLOGOJ proklamis kritikan "manifeston" kontraŭ kelkaj aspektoj de la eklezio, ne sin direktante rekte al ĝi por sugestoj kaj kunlaboro, sed al la bazo, tio estas al la kredantaro, kvazaŭ por provoki tion al premado kontraŭ la eklezia aŭtoritato. Pastroj kaj episkopoj estas invitataj agadi aŭ per si mem aŭ kolektive por trudi reformojn kaj provizore enkonduki siajn solvojn. Temas pri plano de nova eklezia societo, kun novaj regmetodoj, precipe pri elekto de

episkopoj kaj pri vivkondiĉo de sacerdotoj. Ĉu oni devas rememorigi al tiuj teologoj, ke tio, kio koncernas kredodoktrinon, fundamentajn dispoziciojn kaj sakramentojn dependas nek de deziroj de popolamasoj nek de bonvolo de episkopoj, sed de la preciza volo de Kristo, kiel ĝi manifestiĝas el la evangelio kaj estis travivita en la eklezia tradicio? Respondante sur "L'Osservatore Romano" al tiu "manifesto", kard. Garrone reliefigis, kia sintrotakso kaj tromemfido estas, sin opinii aŭtentikaj atestantoj de la evangelio, super kaj kontraŭ tiuj, kiuj en la eklezio havas respondecon pri la integreco de la kredo. Kiaj estus kredo kaj moraleco, sin demandas kard. Garrone se ĉi tiuj estus allasitaj al la ŝanĝiĝema opinio de fideluloj kaj teologoj? Ĉiutage ni spertas, kiel ili turniĝas laŭ ĉiu vento. La kontestantoj, kiuj de longe klopodis atingi siajn celojn, ne malkaŝis siajn elreviĝojn kaj kritikojn al la koncilo kaj precipe al la roma sinodo, pri kio ili havis grandajn esperojn, kiam la tutmonda episkoparo montriĝis stabila kiel roko, kaj fidela al la revelaciita eklezia doktrino.

LA BRUO EKSCITITA DE LA "manifesto" inspiris reagojn aŭ konsentojn laŭ la diversa religia sento de multaj, pro la nombro kaj la nomoj de la kontestantoj. "Sed kio estas tiu nombro, demandas p. Delhaye, en "L'Osservatore Romano", kompare al la kvin aŭ ses mil instruistoj pri teologio en la tuta mondo?" Analizante poste tiujn nomojn ne estas malfacile al li agnoski inter ili tri tendencojn: la skolojn de Tubinga, de Nimega kaj la grupon de "Concilium". Temas do pri tre malgranda minoritato, kiu eĉ ne meritus tro da atento, se kelkaj el tiuj nomoj ne kapablus trompi bonintencajn sed ne sufiĉe prudentajn kristanojn". Fakte, rimarkas la artikolo, kelkaj celoj proponitaj de

tiuj kontestantoj estas la celoj mem de la eklezio: suficas sekvi la paroladojn kaj la agadojn de la papo por konstati, kiom oni progresis laŭ la vojo de kunrespondeco kaj de libereco de konscienco. Male, aliaj celoj estis jam klare rifuzitaj de la eklezio, kiel tiuj kontraŭ la celibato de sacerdotoj kaj pri elekto de episkopoj fare de la dia popolo. Mirigas do, ke post tiom da aŭtoritataj deklaroj, oni ankoraŭ opozicias al la instruado de l' eklezio". Tiuj teologoj sin apelacias al la "spirito" de la Koncilo; sed kiam la eklezio difinas tiun iom elastan vorton laŭ senco ne ŝatata, ili ribelas kontraŭ la eklezio, eĉ instigante ankaŭ aliajn al simila kontraŭstaro! Ĉu tio estas teologio?

SEKVE DE LA DECIDO de Paŭlo VI, jam de kelkaj monatoj anoncita, la grekaj katolikoj celebris la solenon de la pasko en la sama dato de la ortodoksoj ; pro tio, ĉijare du semajnojn post la dato de la roma eklezio. Kompreneble la kultoj estis diversaj por ortodoksoj kaj por katolikoj. En la rusa ortodoksa eklezio okazis la samo, sed unu semajnon post la roma, kaŭze de la diverseco de la "Julia" kalendaro. Oni rimarkis, ke en la ortodoksaj preĝejoj kaj en la monakejo de Zakorsk amasiĝis miloj da fideluloj. Ankaŭ en Romo en tiu sama tago la katolikoj laŭ orienta rito partoprenis en la solenega "Matutino de la Reviviĝo" en la ukrajna preĝejo dediĉita al la sanktuloj Sergo kaj Bakko. Celebris la liturgion kard. Slipyi, ĉef ep. de Lviv.

EN LA ĈIJARA PLENA asembleo de la episkopa konferenco en Kameruno la dek ses episkopoj de la lando pritraktis krom la kutimaj paŝtistaj temoj, ankaŭ aliajn, kunligitajn al la religia servo de la sociaj komunikiloj, al la agado de la militpastroj kaj de la uni

versitataj asistantoj, al la apostolado de la laikuloj, al la katekiza doktrino,al la liturgio. La asembleo, agnoskante neceson de "plenkreska kaj respondeca laikaro," decidis krei nacian konsilion de laikuloj.La laboroj estis karakterizataj, laŭ la ekumena aspekto, per vizito de membroj de la agada komitato de la ekleziaj federacioj kaj de la evangeliaj misioj en Kameruno. La lando nombras hodiaŭ unu milionon kaj duonon da katolikoj, el ses milionoj da loĝantoj. Dek episkopoj estas kamerunaj. 350.000 lernantoj frekventas la katolikajn elementajn lernejojn kaj 20.000 la duagradajn.

LA UNUA EVANGELIZADO de Hindujo estis memorigita per solenaj celebradoj inaŭguritaj la 14an de aprilo, ĉe Malayattoor, apud la nova centro por pilgrimantoj. Post la eŭkaristia kongreso de la 1964a, en kiu partoprenis pli ol cent mil personoj dum tuta semajno, kaj dum tri tagoj kun la papo; post la "nacia kunveno" de la 1968a, en kiu la hinda eklezio laboris por sia nuntempiĝo, jen la trian fojon nova grandioza celebrado por la memorigo de la 19a jarcenta datreveno de la fondo de la hinda eklezio,tio estas,de la martireco de la sankta apostolo Tomaso,okazinta, laŭ tradicio, en la 72a jaro p.K. sur monteto ĉe Madraso. Arkeologiaj lokaj esploroj antaŭ ne longe konfirmis tion, ĉar oni trovis epigrafon sur granda ŝtono en la sassanlan-Pahlavi, la antivka persa sanskrito, kun la "kruco de sankta Tomaso". En la centro de la granda katedralo de Mylapore, la portugala Madraso, preskaŭ samtempe, elfosaĵoj remalkovrigis la tombon de la Sanktulo. Inaŭguris la celebradojn la papa legato kard. William Conway, aklamita de sennombra popolamaso kun flagetoj. Je la nokto de la 15a miloj da personoj kun torĉoj pilgrimis al la supro de la Monto

Sankta Tomaso, kie ĉiuj ricevis la eŭkaristion. Ankaŭ la fina procesio de la 16a, dimanĉe, pli ol triumfoplena manifestacio, estis spektaklo de kredo kaj preĝado. Manifestacio sur la sama marbordo, kie Sankta Tomaso antaŭ tiom da jarcentoj predikis unua la kredon je Kristo, kaj kie post diversaj jarcentoj Sankta Francisko Savero revigligis la malnovajn kaj malgrandajn kristanajn komunumojn. Hodiaŭ fervora vivo pulsas en la hinda eklezio, kiu povas nombri du kardinalojn, longan serion da episkopoj kaj katolikajn centrojn ĉie dissemitajn. Sed la jubilea datreveno favoris ankaŭ ekumenajn celebradojn. Partoprenis sinsekve en la katedralo, per siaj solenaj liturgiaj ritoj la ortodoksaj episkopoj de Malabaro kaj protestantoj el tri diversaj konfesioj. Neniam ĝis nun en Hindujo okazis antaŭe tiaj gravaj interkonfesiaj renkontiĝoj. Kaj ilia plena sukceso esperigas la plej belajn fruktojn por la estonteco. Tiuj celebroj ebligas bilancon pri la tuta laboro de la katolika eklezio en Hindujo. Kvankam la hindaj katolikoj ne estas pli ol sep milionoj, tio estas la du procentoj de la tutlanda loĝantaro, la influo, kiun ili havas, longe superas la kvantan konsiston. Tio devenas ĉefe de la vasta aktiveco en la socia kaj eduka kampoj. 6.000 elementaj lernejoj, 2.000 duagradaj kaj pli ol cent kolegioj je universitata nivelo, donas eblecon de instruado al dek procentoj de la hindaj studentoj. En la medicina kampo la agado de la eklezio estas same alte taksata. Estas precipe religiulinoj, kiuj prizorgas tion, per 200 hospitaloj kaj centoj da dispensarioj. Miloj da infanoj senhejmaj aŭ orfaj estas asistataj en 600 institutoj. Sed ĉi tio estas nur la ekstera, verŝajne la plej okulfrapa aspekto de la eklezia agado, kiu, kvankam sin dediĉas al la progreso de la loĝantaro, ne forgesas sian unuan celon, kio estas evangelizado. En ĉi tiu kam-

po, krom la intensaj klopodoj por enkarnigi en la landon la kristanan mesaĝon, per multenombraj kontribuaĵoj pri hinda teologio, fare de seminarioj kaj de teologiaj fakultatoj, oni devas kalkuli ankaŭ la ne malmultajn progresojn en la efektivigo de liturgia reformo enradikita en la hinda kultura bazo.

FINANCA HELPO DE OK MILIARDOJ da italaj liroj, fare de la Usona registaro al la katolika hinda eklezio estis malpermesita de la hinda registaro. Temis pri kontribuaĵo destinita al la hinda episkopa konferenco en la usona programo pri helpoj al eksterlando. Al interveno de episkopoj ĉe la registaro por permesi tiun gravan helpon el Usono, respondis per decida rifuzo la ĉefministro mem de Hindujo. Tiu rifuzo estas konsekvenco de la sendependa ekonomia politiko, proklamita fine de la pasinta jaro de la hinda registaro, laŭ kiu oni decidis malpermesi ĉiujn kontribuaĵojn devenantajn de Usono. La katolika servo de la hinda gazetaro, komentante la fakton, asertas, ke la hindaj episkopoj estas inter la unuaj viktimoj de tiu rifuzo. Estas tamen kompreneble, ke tiu sinteno devas esti rigardata en la kadro de la streĉa tensio estiĝinta inter Hindujo kaj Usono dum la milito hinda-pakistana kaj de la neceso de ekonomia sendependo, per kiu la lando klopodas kuraĝe reakiri sian aŭtonomion. Tiu sumo devis helpi al la konstruo de moderna kuracista centro en Bangalore. Temas pri hospitalo kun ebleco de 750 litoj kaj kun centro por medicinaj studoj. Ĝia konstruado estis decidita de la episkopa konferenco memore de Johano XXIII, fine de la eŭkaristia internacia kongreso de la 1964a en Bombajo. La germanaj katolikoj pere de "Misereor" donacis, enkonduke de la entrepreno, 4 miliardojn kaj duonon da liroj. Nun ĉi tiu centro, kiu dum siaj malmultaj vivojaroj jam akiris rimarkindan famon, estas en serioza danĝero.

LA GERMANA KATOLIKA porasista organizo "Misereor" anoncis programon por helpoj al Bangla Desh. Ĝi kolektis 20 milionojn da dolaroj por doni terkulturajn maŝinojn al 200.000 rifuĝintoj. Kaj 200 milionoj da dolaroj estis samtempe destinitaj al realigo de projektoj por progreso de diversaj nacioj en la latina Ameriko, Afriko kaj Azio.

KVARDEKO DA JUNAJ VOLONTULOJ el diversaj landoj forveturis el Tokio al Bangla Desh por donaci sian personan helpon inter la senesperaj vivkondiĉoj de tiuj popoloj post la militruinoj. Temas pri studentoj, instruistoj kaj profesiuloj, kiuj iras al Bangla Desh por 4 monatoj, por instrui la loĝantojn de la nova ŝtato pri agrikulturo kaj taĉmenta laboro. La iniciato estis enkondukita kune de la tutmonda Konsilio de la eklezioj kaj de la katolika "Caritas Internationalis". La 40 junuloj estis elektitaj el pli ol cent, kiuj sin oferis por tiu entrepreno, surbaze de kelkaj ĉefaj kondiĉoj: fortika sano, sperto pri agrikulturo, instrua kapablo, rezisto kontraŭ la altaj temperaturoj de Bangla Desh. La vojaĝelspezoj estis pagitaj de la japana "Caritas" kaj de la nacia Konsilio de la eklezioj; dum la elspezoj de vivteno estos pagitaj de la "kristana organizo por asisto kaj reeduko" kaj de la ekumena "helpa kaj reeduka servo de Bangla Desh".

LA FRANCISKANA "GARDO DE la Sankta Lando" atingis 755 vivojarojn. La historio de tiu glora institucio estas tiel kompleksa, pro la tre malfacila misio, kiun ĝi ricevis de la eklezio, kaj kiun la franciskana ordeno plenumis dum pli ol sep jarcentoj kaj duono, ke ĝi ne povas esti resumita per malmultaj linioj. Por esprimi tamen ion per nombroj, ni povas diri nur, ke hodiaŭ ĝi zorgas pri 74 sanktejoj, 5 bazilikoj, 65 preĝejoj, 45 kapeloj, 41 parokoj; krome, pri 3 malsanulejoj, 12 some-

raj libertempejoj por infanoj, 20 dispensarioj kaj ambulatorioj, 25 lernejoj, 3 kolegioj; pri filma centro, biblia instituto, centro por orientaj studoj, du industriaj lernejoj por viroj kaj naŭ por virinoj, 14 diversaj laborejoj, inter kiuj tipografio, kiu estas el la unuaj en mezoriento, ktp., ktp., kun ĉirkaŭ 500 misiistoj el 26 landoj. Aktuala ĝenerala Gardanto de la Sankta Lando estas p. Erminio Roncari, OFM.

EN LA SUDA KOREO Jesuitoj faris enketon, komisie de la Korea episkoparo, pri la intereso, kiun vekas katolikismo en la lando. El la 3.500 personoj intervjuitaj en urba kaj kampara medio, ili deduktis, ke la 28,5 procentoj indikas katolikismon, kiel la religion, kiu altiras pli da estimo; la 23,3 p.c. indikas buddismon; la 19,8 p.c. protestantismon, kaj la 2,3 p.c. konfuceanismon. Rimarkinde estas, ke la katolikoj en la Suda Koreo estas nur 778.000, el loĝantaro de pli ol 32 milionoj da personoj. Bedaŭrinde, el la sama enketo rezultis, ke la plejparto de la loĝantaro, la 60 p.c. de la intervjuitoj, sin deklaris ateista; la 19 p.c. buddista, la 11 p.c. protestanta, kaj la 6,4 p.c. katolika.

LA USONAJ EPISKOPOJ lanĉis alvokon por ĉesigi kiel eble plej rapide la Vietnaman militon. Interalie ili skribis: "Estas jam nun evidente, ke ĉiu ajn profito, kiun oni povas atingi pere de eventuala venko, estas jam abunde nuligita pro la detruo de homaj vivoj kaj pro la malestimo de moralaj valoroj, kiujn la konflikto kuntrenas". Jam antaŭ ĉi tiu alvoko de la episkopa konferenco, diversaj episkopoj same admonis kontraŭ tiu milito.

LA VIVO DE PLI OL MIL INFANOJ, konsideritaj kiel filoj ne atenditaj aŭ ne deziritaj, estis savita en la lastaj dek du monatoj de la katolika organizo "Birthright" (naskiĝrajto), enkondukita de kard. Terence Cook, ĉef

ep. de Novjorko. La organizo, estiĝinta kiel konkreta rimedo kontraŭ la liberigo de aborto, aprobita en la Novjorka ŝtato dum la 1970a, atingis ĝis nun pere de telefonaj konversacioj aŭ personaj intervjuoj, plenumitaj de grupo de fakaj sociaj asistantoj, grandan nombron da virinoj, kiuj konsideris aborton kiel unikan solvon al siaj problemoj. "La virinoj, kiuj telefonas al ni - deklaris la direktorino de "Birthright", Nora Flanigan - estas teruritaj, konsternitaj, kaj ofte tute senesperaj". La plej parto de la ĉirkaŭ 5.000 telefonadoj ricevitaj dum la jaro, venis de knabinoj malpli ol 25-jaraj aŭ malpli ol 18-jaraj, kies gepatroj vidis aborton kiel unikan elirvojon. Ŝi deklaris, ke estas "alarmiga" la nombro de gepatroj de junulinoj, kiuj insistas pri aborto.

EN LA 141 PREĜEJOJ kaj kapeloj de la brita diocezo de Shrewsbury estis legita je la 16a de aprilo letero de mons. Grasar kaj de lia helpepiskopo mons. Brewer, per kiu oni anoncas konkretajn asistojn favore al virinoj, kiuj troviĝas en malfacila situacio pro ne dezirita gravedeco. La diocezo de Shrewsbury - oni legas en la dokumento - publike deklaras sian solenan promeson: al ĉiu estonta patrino, katolika aŭ ne, estas certigata praktika kaj tuja helpo, sekreta kaj senpaga, se ŝi, pro ne dezirita gravedeco, intencas naski la infanon kaj ne aborti. Ĉi tiu helpo entenas, se ŝi tion deziras, vartadon por la infano post ĝia naskiĝo. Ĉiuj havaĵoj de la diocezo estas metitaj je dispono por ĉi tiu tasko". En tiu letero oni esprimas konsternon pro la neniigo de pli ol 100.000 homaj vivoj, plenumita pasintjare en Britujo per aborto, legalizita en la lando ekde la 1967a.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONKOTIZO: It.£.:1.000 (=Us.dol.1,60)
Poŝtĝirkonto 3-7791 al D.ro C.C.Ferrari
aŭ 1-37638 al P.Giacinto Jacobitti.